

La naciaj malplimultoj en Ĉeĥoslovakio.

D-ro František Weyr,
universitata profesoro en Brno.

Nia ĉeĥoslovaka respubliko, kiu estiĝis sur la teritorio de la estinta aŭstro-hungara monarĥio, heredis de tiu ĉi regno unu ne tre oportunan econ: ĝi ne estas unueca, ĝia loĝantaro konsistas el kelkaj nacioj. Al la venkintaj ŝtatoj de la Entento estis post ĝia fondo tuj klare, kaj kun ilia konvinko konsentis la decidantaj ŝtatistoj kaj politikistoj ĉeĥoslovakaj, ke estos necese fiksi la leĝan bazon de la popolaj malplimultoj, speciale de la germana kaj hungara. Oni garantiis iliajn rajtojn, por ke la ĉeĥoslovaka respubliko ne iru renkonten la saman sorton kiel la aŭstro-hungara monarĥio, kies pereco estis kaŭzita unuavice per la miopa kaj maljusta politiko rilate la diversajn naciojn, per kiu ili estis traktataj dum centoj da jaroj flanke de ĝia dinastio kaj la regantaj nacioj: la germana kaj hungara. Estis la miopa politiko, kiu puŝis la monarĥion en la militon kaj kiu, batalante ĉe l'flanko de Germanujo, decidis la sorton de l'monarĥio.

Pri la protekto de la naciaj malplimultoj en Ĉeĥoslovakio zorgas unuflanke leĝoj bazitaj sur la leĝaro de l'konstitucio, ekzemple la konstitucia leĝo lingva, aliflanke internaciaj kontraktoj. En ili Ĉeĥoslovakio kontrakte ligis sin - cetere ankaŭ grupo de aliaj ŝtatoj kun naciaj malplimultoj - ke ĝi metos en sian leĝaron certajn garantiojn rilatantajn la leĝajn rajtojn de siaj naciaj malplimultoj. La garantioj koncernis la principan egalrajton de ĉiuj regnaroj antaŭ la leĝo, kaj tio en kelkaj direktoj, nome rilate la religion, kredon kaj konfeson kaj la u z a d o n de l'lingvo, kio nin ĉi tie speciale interesas. En tiu ĉi punkto estas garantiitaj al la naciaj malplimultoj certaj minimumaj lingvaj rajtoj, ekzemple: ke al ĉiuj ĉeĥoslovakanoj apartenantaj al alia lingvo ol la ĉeĥoslovaka, estas donota certa ebleco uzadi skribe kaj buŝe sian lingvon oficiale, spite al la eventuala starigo de oficiala t. e. ŝtata lingvo en Ĉeĥoslovakio, kia estas laŭleĝe la lingvo ĉeĥoslovaka.

Simile estas garantiita per internacia kontrakto - t.e. la t.n. kontrakto de St. Germain de la 10-a de oktobro 1919 - la ebleco instrui en sia propra lingvo. Garantiita estas al la malplimultoj ankaŭ parto de l'monrimedoj el la publikaj budĝetoj. Ĉiujn ĉi garantiojn fakte transprenis la ĉeĥoslovaka konstitucia leĝaro grandparte laŭvorte, kiel oni vidas en la sesa ĉefparto, kies superskribo estas: "Protekto de malplimultoj n a c i a j, religiaj kaj rasaj." Sed tiun ĉi protekton oni ne povas larĝigi ĝis nuligo de la nacia karaktero de nia respubliko, kiu ja estas ĉeĥoslovaka. Tion ne postulis de ni la internaciaj kontraktoj kaj ne povas postuli justa ano de niaj malplimultoj germana aŭ hungara. Tiu ĉi ŝtato estis ja fondata ĝuste tial, por ke la ĉeĥa kaj slovaka popoloj havu - post tiom da jarcentoj - sian propran hejmon, en kiu ĝi povus evolui kulture, lingve kaj politike, por ke ĝi povu envicigi sin kiel egalrajta popolo en la vicon de pli feliĉaj popoloj, kiuj jam longe antaŭ la mondmilito havis siajn ŝtatojn, kiel la popoloj germana, franca, itala k. a. Estas do nek analoga nek justa la postulo farita siatempe de kelkaj flankoj, ke la cirkonstancoj rilate al la nacioj en la ĉeĥoslovaka respubliko estu ordigataj same kiel en Svisujo kaj ke Ĉeĥoslovakujo fariĝu dua Svisujo. Ni ne forgesu, ke en Svisujo vivas tri grandaj popoloj - la germana, franca kaj itala - el kiuj ĉiu unuopa havas sian propran hejmon, ekster la ŝtatlimo. Sed la popoloj ĉeĥa kaj slovaka havas sian hejmon nenie krom en sia ŝtato kaj ilia hejmo do devas esti nacie ĉeĥoslovaka. Tio nature neniel malhelpas doni plenan liberecon por nacia evoluo al siaj popolaj malplimultoj, kiujn ĝi neniel deziras perforti aŭ alinacianigi.

La ĉeĥoslovaka popolo - ni parolas nun pri ĝi en senco nacia sed ne ŝtatana, kiel uzas ĉi tiun esprimon ekzemple la Francoj - ne nur tute plenumis siajn devojn, nome ke ĝi metis leĝajn garantiojn pri protekto de malplimultoj en sian leĝaron, sed - kaj tio estas pli grava - ĝi praktikas sian ĝeneralan politikon en senco de nacia toleremo. Kompreneble troviĝas ankaŭ en ĝi - kiel en ĉiuj popoloj - individuoj, kiuj la nacian ideon superflue tro akcentas opiniante, ke servi al sia propra popolo signifas batali kontraŭ la ceteraj. Sed tiuj ĉi esceptoj estas sensignifaj. Estas kompreneble ankaŭ anoj de la popolaj malplimultoj - mi pensas speciale je la germanoj kaj hungaroj - kiuj plendas, ke iliaj naciaj rajtoj ne estas sufiĉe respektataj, sed ŝajnas, ke tiuj ĉi troaj naciistoj estus kontentaj kun neniuj ordoj rilatanta al la popolaj malplimultoj en Ĉeĥoslovakujo, ĉar sekrete ili sopiras ĝuste tion, kion la mondmilito forbalais por ĉiam, nome la nacian superregon en Aŭstrujo

kaj Hungarujo. Por montri kelkajn ekzemplojn al malpli bone informitaj aŭskultantoj ĉar vivantaj en aliaj ŝtatoj, kiel oni ĉe ni kondutas kun la g e r m a n a malplimulto, ni mencias, ke tiu ĉi malplimulto, post kiu staras granda, riĉa kaj kulture evoluinta popolo, partoprenas kun la ĉeĥoslovaka popolo en la regado de nia ŝtato, estante en la registaro reprezentata per siaj ministroj; ke bone prizorgitaj estas ĝia publika instruado, ĝia reprezento en la oficistaro kaj militistaro kaj ĝenerale en la publika vivo kaj ke la ekstreme justa balotleĝo garantias al ĝi kaj al la ceteraj malplimultoj justan proporcian reprezentadon en la parlamento kaj en la cetraj publikaj korporacioj. Restis al ĝi memkompreneble ĝia universitato en Praha kaj restis al ĝi ĝiaj teknikaj altlernejoj en Praha kaj Brno, do la sama nombro, kiun la ĉeĥoslovakoj - ankaŭ en Praha kaj Brno - mem havas. Respektinda estas la nombro de ĝiaj mezlernejoj kaj popollernejoj. Fine mi mencias, ke ĝi kaj la ceteraj malplimultoj ĝuas la grandan feliĉon, ke sur la estra loko de la ŝtato estas viro ekstreme justa kaj treege malproksima de miopa naciismo, fakto pruvita per lia tuta vivo, mallonge dirite, viro de vere internacia formato kaj vasta spirita horizonto, nome prezidanto Masaryk. Kion do povus niaj malplimultoj ankoraŭ deziri? Ili kaj la ĉeĥoslovaka popolo havos la taskon reciproke sin subteni kaj konatiĝi. La ĉeĥoslovaka popolo estas pacema, kion ĝi pruvis per sia tuta historio. Ĝi estas malgranda popolo, kiu ne ŝatas batalon; ĝi nur d e f e n d a s sin, se ĝi estas atakata. Ĝi havas komprenemon por internacia vivo kaj rilatoj. Tial bone prosperas en ĝi ĉiuj tendencoj, kiuj tiun ĉi vivon kaj rilatojn subtenas, ekzemple la esperanta movado kaj rotarianismo. Nia popolo kredas je plia proksimiĝo kaj interfratiĝo de l'popoloj kaj ŝtatoj. Se oni progresados sur tiu ĉi vojo, tiam oni povas esperi, ke fariĝos superflujaj la internaciaj kaj ŝtataj garantioj de rajtoj al la nacioj ĉe ni kaj en aliaj ŝtatoj, ĉar ĉiuj ŝtatoj ekkonus, ke ili kune estas unu korpo, ligita per komuna kulturo kaj humaneco. Mi ĝojas, ke tiu ĉi parolado estas komprenigata al la eksterlanda aŭskultantaro per la lingvo esperanto, ĉar ankaŭ ĝi estas rimedo, destinita por la interkompreniĝo kaj alproksimiĝo de la unuopaj popoloj.

Tradukis Th. K.
30. V. 1934.